

de *Dancu, marionetoj!* kaj *Migranta plumo*. En la poemoj ĝi aperas malpli okulfrape. Feliĉe, kun paso de la tempo lia stilo ĉiam pli sobriĝas, kaj meze de la tridekaj jaroj ĝi atingas — se ne klasikan perfektan — ĉiukaze temprezistan nivelon.

Se ni volas resumi nian opinion pri la estetikaj kvalitoj de la verkaro de Baghy, ni devas diri, ke ĝi atingas la duonon de la nivelo, kiun la publiko atribuas al ĝi, sed almenaŭ duoble pli valora ĝi estas, ol la flustra klaĉo de la kleruloj asertas. Vere, ĉe malmultaj verkistoj oni trovas tiel grandegan diferencon inter la nivelo de opaj verkoj — sed ni devas lin akcepti tutan. Kaj tio ne estas malfacila, ĉar, se kun malfermitaj oreloj ni aŭskultas lian voĉon, ni rimarkos, ke verkoj sukcesintaj kaj malfortaj egale estas organikaj elementoj de lia verkado.

★

Baghy ne estis mondliteratura giganto: eĉ en nia literaturo troviĝas ne malmultaj, kies talento superas lian. Tamen, lia rolo en nia literaturhistorio estas unika: multe pli grava, ol la abstrakta analizo de

la estetikaj kvalitoj de liaj verkoj supozigus. Li aperis en decida historia momento kaj rekonis la pretendojn de la epoko, kaj per tio li fariĝis — post Zamenhof — la dua fondinto de nia literaturo. Li kreis legantaron por la esperanta literaturo — sen legantaro literaturo ne ekzistas! —, amasoj komencis legadon per liaj verkoj. Baghy signifis kaj eĉ nun signifas necesan ŝtupon por la mezinstruita homo sur la vojo de la konkero de pli altaj turoj de nia literaturo. Lia verkista kaj kultura agado havas netakseblan rolon en la disfloro de „Literatura Mondo” kaj eĉ en la nuna relativa vigleco de la libromarkato. Li do vere meritas nian respekton kaj amon, sed ni devas nepre detruigi la falsan Baghy-idolon por anstataŭigi ĝin per statuo de la vera Baghy. Ni devas ekkoni la mesaĝon de lia verkaro, kaj por atingi tion ni devas per objektivaj okuloj relegi lian verkaron. Por ebligi tion ŝlosila tasko de niaj eldonejoj estas reeldono de liaj neaĉeteblaj verkoj, por ne paroli pri la plej inda monumento al li — kritika eldono de lia Plena Verkaro.

Vilmos Benczik

Esperanto kiel lingvo de la moderna tekniko

Dum mia studentaĝo ni, hungaraj politeknikaj studentoj, multe devis lukti kun la manko de bonaj faklibroj. Hungaraj faklibroj apenaŭ aperis, kvankam nia industrio tiutempe jam estis relative evoluinta. Antaŭ la fino de la pasinta jarcento jam ĉiuj Budapeŝtaj tramoj estis elektrigitaj. Ĉi tie funkciis la unua subtera tramo de la kontinento. Ni fabrikis la unuajn motorvagonojn por la Londona subtera fervojo, la unuajn elektrajn lokomotivojn por la Valtellina fervojo en Italio. Niaj muelmaŝinoj reprezentis la plej altan teknikan ŝtupon de tiu fako.

Kaj ni tamen ne havis faklibrojn.

Kial?

Ĉar en la mezlernejoj ĉiu devis lerni

la germanan lingvon. Teorie ĉiu politeknika studento devis koni tiun lingvon. Do, konsiderante, ke la germanoj havis abundon da bonaj teknikaj libroj, ne estis profitdone eldoni hungarajn faklibrojn por la eble dekmil maŝinfakaj inĝenieroj, kiuj laŭteorie komprenis la germanan lingvon.

Sed nur laŭteorie. En la realo ankoraŭ ne troviĝis homo, kiu en lernejo ellernis fremdan lingvon. Precipe ne faklingvon.

Tiam ankaŭ mi devis ellerni la germanan faklingvon, kies rezulto estis, ke mi enkapigis la teknikan lingvon, sed la ĉiutagan eĉ nun mi ne scias.

En kelkaj fakoj, — ekzemple en elektrotekniko, — pli bonaj estis la anglaj libroj.

Do, mi devis ellerni ankaŭ la anglan elektrofakan, skribatan lingvon. (Mi akcentas: Skribitan lingvon, ĉar la angloj havas du diversajn lingvojn: la skribatan kaj la parolatan.)

Do, mi devis ellerni la du tiutempe plej teknikemajn lingvojn kaj kun la scio de ambaŭ lingvoj mi estis tamen lama kaj nekompeta inĝeniero. La teknika scienca materialo ĉiam plimultiĝis, kaj nuntempe ĝi jam faras tiom grandan komplekson, ke neniu povas certe orientiĝi.

★

Tiun necertecon kaŭzas unuavice la giganta vastiĝo de la tekniko, kaj vane ni klopodas dividi la inĝenieran laboron al pli kaj pli da subfakoj, ĉar tiuj fakoj ĉiam kunkroĉiĝas. Se ni studas unu problemon, ni ĉiam frapiĝas kontraŭ la limmuroj de la alia fako.

Sed tamen, ĉi tiu malfacilaĵo estas ankoraŭ la pli malgranda. La plej grava estas la limmuroj de la lingvoj.

La tekniko ĉiam pli internaciĝas. Komence estis normoj nur pri la ŝraŭboj. Internaciĝis la Whitworth, poste la metrikaj normoj. Normiĝis la kudromaŝino kaj la biciklo, la elektraj muntaĵoj, la fertraboj, ktp. Nuntempe la normoj faras ne volumojn, sed tutan bibliotekon. Ekzistas jam internacia normiga oficejo: ISO (Internacia Organizo por Normigo). Ties anoj estas en 55 landoj kaj ĝi havas 112 fakkomisionojn.

Entute la tekniko postulas internacian rolon. Matematiko jam apriorie estis internacia scienco. Ne estas imagebla franca kaj sveda matematiko. La elektraj kondukiloj, gastuboj, naftotuboj jam delonge traboris la landlimojn, ne povas ekzisti speciala norvega kaj dana elektra tensio. La metrosistemo, kiel mezurunuoj, sin trudas iom post iom al ĉiu lando de la mondo. Tiuj, kiuj pro nacia tradiciemo kontraŭstaras la evoluadon, suferas gravan malprofiton kaj estas iom post iom devigataj por cedi al la racia tendenco. Sen tiu ĉi internaciĝo la tekniko neniam estus atinginta la hodiaŭan nivelon.

Nur la lingvo ne internaciĝis.

Interese estas, ke inter la taskoj de la internacia normiga oficejo, la plej vastan

terenon okupas la fiksado de la terminoj. La nomenklaturon. La oficejo kreas plejparte difinojn.

Kial? Ĉar ne nur la diverslingvaj terminoj, sed eĉ la samlingvaj estas malsamaj. Ekzemple, la tornomaŝino havas dentradkeston, per kiu oni povas ŝanĝi la rapidecon de la rotacio. Tiu ĉi dentradkesto havas en la hungara lingvo kvar diversajn nomojn. Samaj sinonimoj abundas en ĉiuj aliaj lingvoj. Kaj krom la sinonimoj abundas la homonimoj, t.e. kiam la sama vorto havas diversajn sencojn. Ekzemple la angla „screw” kaj la germana „Schraube” signifas ŝraŭbon kaj propeleran helicon. Mi diris la neoficialan vorton „propelero”, ĉar bedaŭrinde „helico” ankaŭ en Esperanto estas duŝenca homonimio: ĝi signifas ŝraŭblinion kaj propeleron.

Precipe la angla lingvo abundas je homonimoj. Ekzemple la verbo „to take” en la granda angla-hungara vortaro okupas naŭ kolonojn kaj duonon kun pli ol 36.000 literoj. Unu sola vorto!

La vorto „peg” havas 25 signifojn el la plej diversaj branĉoj. Ekzemple: najlo, stifto, tenono, ŝtopilo, paliso, kordostreĉilo, signalstango, mineja apogtrabo, navedo, proteza kruro, preteksto, vesthoko, eskala ŝtupo, piedo de violonĉelo, glaseto da brando, nekalkulante la verbajn signifojn.

Sed ĉi tiu vorto estas ankoraŭ unu el la plej mildaj. Bonvolu nun imagi la signifojn de „paper”, „neck”, „needle”, „head” kaj „horn”, por mencii nur kelkajn, ofte uzatajn vortojn.

Kial? Ĉar tiuj homonimoj plimultiĝas kune kun la tekniko. Por novaj teknikaj konceptoj ni uzas malnovajn vortojn. Bonvolu nur pensi pri la nomoj de maŝinpartoj! La maŝinoj havas piedon, brakon, kapon, denton, nazon, kolon, kubuton, artikon, ktp., kiuj nomoj estas prenitaj el la anatomio. Por radiofonio ni uzas la netaŭgan homonimecon „radio”.

Vane klopodas la internacia normiga oficejo krei unusolan nomenklaturon. Ĝi povas eble aranĝi kaj precizigi la nomenklaturon en la angla aŭ franca lingvo, tamen poste ĉiuj aliaj apartaj linvoj devas same precizigi siajn proprajn vortojn. Kaj kio garantias, ke post la aranĝo de ĉiu-

lingvaj nomenklaturetoj, iu angla vorto konformos al unusola, strikte difinita germana vorto?

Ankaŭ mi mem okupiĝis per traduko de teknikaj artikoloj kaj spertis, ke ofte tute ne eblis senerare traduki. Tiu vorto, kiu en elektrotekniko havas ian sencon, la sama en tekstilindustrio havas tute alian sencon, kaj ofte oni neniel povas ektrovi, kian sencon uzi en la traduko.

Foje mi legis, ke en Anglio iu, — mi jam ne scias, kiu — mezurunuo havis alian grandecon, ol sur la kontinento. La kaŭzo estis malkorekta traduko pro homonimoj.

Sed kial ni devas vivi en tiu ĉi konfuzo?

Se botanikisto diras la sciencan nomon „Linaria Vulgaris”, ĉiu alia botanikisto tuj, senerare pensas pri vegetaĵo, havanta flavajn grapolajn florojn. Se zoologo aŭdas la vorton „Mustela Foina”, li tuj pensas pri grizbruna rabbesteto, kaj neniu konfuzas ĝin kun la iom pli granda, sed tre simila „Mustela Martes”.

Do, se en la botaniko kaj zoologio ekzistas unueca, preciza kaj nemiskompenebla latina nomenklatureto, kial ĝi ne troviĝas en la tekniko, kiu hodiaŭ inter ĉiuj sciencoj estas la plej grava?

Kaj vere ĝi ne ekzistas kaj eĉ ne povas ekzisti.

Kial?

Ĉar la latina lingvo estas taŭga por la botaniko kaj zoologio, sed ne taŭgas por la tekniko, kiu estas la plej juna scienco inter ĉiuj sciencobranĉoj.

Dum la romia imperio vivis la samaj vegetaĵoj kaj bestoj, kiuj hodiaŭ. Vivis hundo, ĉevalo, leono, foino kaj mustelo, vivis rozo, dianto, akacio kaj kverko, sed ne estis televido, ferbetono, alttensio, elektra kondensatoro, dizellokomotivo kaj elektra amplifilo.

Do, ni povas deklari sen iu ajn fanfaron:

1. Hodiaŭ la plej ampleksa kaj grava scienco, kiu plej fundamente influas kaj determinas nian vivon, estas la tekniko.

2. La evoluon de la tekniko forte malhelpas la malstrikteco de la terminoj kaj

precipe la manko de strikta, unueca, internacia scienca terminaro.

3. Por tiu celo ne taŭgas la antikvaj, arkaikaj lingvoj, sed tiom pli kaj unusole taŭgas Esperanto, la plej juna, plej progresigebla lingvo.

Nia lingvo estas la plej fleksebla. La franca lingvo havas 2,500 verbofinajojn. Esperanto havas nur dekdu. Sed per tiuj dekdu finajoj ni povas esprimi multe pli da nuancoj, ol la franca. Per la vortfarantaj sufiksoj ni povas fari nekompareble pli da nuancoj, novaj konceptoj, ol iu ajn, nekonscie, arbitre evoluinta lingvo. Niaj vortfarantaj sufiksoj estas striktaj kaj nemiskompeneblaj.

Por komparo vi bonvolu permesi mencii mian propran, hungaran lingvon. Ni havas tielnomitan „grandigan” sufikson „SĀG” (pr: ŝag). Se ni metas ĝin post la vorto „sinjoro”, ĝi signifas vere grandsinjoron. Metante post „soldato”, ĝi jam signifas ne grandan, sed multajn soldatojn, do: „soldataro”-n. Metante post „bela” ĝi jam signifas nek grandan belon, nek multon belan, sed „beleco”-n. Metante post „lerni”, ĝi signifas lernitan aferon. Por tiuj kvar diversaj vortotipoj Esperanto havas kvar diversajn sufiksojn: sinjorEGo, soldataro, beleCO kaj lernAJo.

Niaj malamikoj ofte riproĉas Esperanton, ke ĝi estas nenatura, maŝineca, mekanika lingvo. Do, se ĝi vere havas tiujn avantaĝojn, kial oni ne tuj ekprenas la okazon apliki ĝin al la inĝeniera scienco?

La stulteco de kontraŭesperantismo estas senlima. La kontraŭuloj forte kredas, ke Esperanto ne povas esti taŭga lingvo, ĉar ĝi estas artefarita.

Mi vidis foje karikaturon: Azeno rigardas aŭtomobilon kaj diras:

— Jes, ĝi estas pli komforta ol mia dorso. Ĝi estas vere pli rapida ol miaj piedoj, sed ĝi estas bedaŭrinde — artefarita!

Esperanto estas ĝuste tial pli bona, pli taŭga ol la senorde kreskintaj lingvoj, ĈAR ĝi estas artefarita, ĈAR ĝi estas laŭplane, celkonscie konstruita. Se ni diras: „soldataro”, neniu pensas pri soldatego aŭ soldateco.

En la hungara lingvo troviĝas verbo „véd”. Tiu signifas: defendi, ŝirmi, pledi kaj protekti. En Esperanto troviĝas por ĉiuj kvar signifoj apartaj vortoj. Kaj tamen, Esperanto havas la plej malmultajn vortojn. Kial povas ekzisti tiu ŝajna kontraŭdiro? Pro la artefariteco, pro la konscia konstruiĝo. Ne nur la malriĉa hungara lingvo, sed ankaŭ la angla lingvo per sia duonmiliono da vortoj ne povas tiom da nuancoj esprimi, kiom Esperanto per ĉirkaŭ dekmil vortoj.

La naciaj lingvoj jam ne povas evolui kune kun la rapidega evoluo de la tekniko.

★

Alia gravan taskon havas nia lingvo en la teknika biblioteka fako. La teknika literaturo estas jam tiom ampleksa, ke pli ne ni povas orientiĝi. La subfakoj plimultiĝis kaj, se oni serĉas iun difinitan, specialan temon, eble li povus ĝin traduki al sia propra lingvo, sed ne povas trovi, kie kiu libro traktas la problemon. Kelkaj bibliotekoj pretigas resumon el la enhavoj, sed la bibliotekistoj ne estas teknikaj fakuloj kaj povas pretigi nur tre malkorektajn resumojn.

Tiu ĉi branĉo estas la dua, en kiu nia lingvo havas antaŭdestinitan rolon, kiun la nuna mondo bedaŭrinde ne ekspluatas. Se ĉiu libro havus esperantan resumon, la serĉado de la fakliteraturo tuĵ faciligus. La bibliotekistoj devus scii nur Esperanton kaj legi la resumon, eble traduki ilin al nacilingvo.

Entute, Esperanto estas trezoro, kiu alportus nemezureblan profiton al la mondo kaj kiun la mond' eterne militanta tamen ne eluzas pro miopa, tute erare perceptita naciismo, per kiu oni multe malutilas ĝuste al la naciaj interesoj.

★

La avantaĝoj kaj utileco de Esperanto estas okulfrape klaraj. Verŝajne mi nun ĉi tie faris nur tute superfluan fortoŝtreĉon, kiam mi argumentis tion al vi, kaj vi ŝajne plenrajte demandus: kial nun mi argumentas al vi, kiuj plej volonte akceptigus Esperanton, sed bedaŭrinde la afero dependas ne de vi.

Tamen la oficialigo de nia lingvo ne

estas tute sendependa de ni. Ankaŭ ni havas taskojn sur ĉi tiu tereno. Ne nur la propagandon.

Ni havas farendadojn ankaŭ en kompletigo de nia lingvo, por ke ni perfektigu ĝin al tiu rolo.

★

Unue ni devas krei unuecan, kompletan teknikan vortaron.

Ho, ni ne povas plendi! Multegaj teknikaj fakvortaroj pretiĝas, eĉ tro multaj, tiel ke la vortaro-riĉeco jam pli malutilas ol utilas, ĉar ili kreas ĉiujn siajn favoratajn, diferencajn terminojn, por sama koncepto. Ofte eĉ erarajn. Mi mencias nur, ke laŭ Scienc-Teknika Terminaro „Molibdeno” identas kun tungsteno (alino: volframo), kvankam molibdeno estas la 42-a kaj tungsteno estas la 74-a kemia elemento. „Mimeografi” laŭ STT estas „hektografi”, kvankam tiuj estas tute malsamaj multobligaj metodoj. La vorton „matrico”, kiu signifas negativan formon, ĝi uzas por la matematika koncepto „matrikso”, ktp.

La eraraj vortoj abundas ne nur tie, sed en ĉiuj niaj fakvortaroj. Mi menciis nur ekzemplojn el modela vortaro.

Krome, la vortoj de la diversaj vortaroj ne samas. En Plena Vortaro „elektronvalvo” estas en la pola Internacia Elektroteknika vortaro „elektrontubo”; „atompezo” estas „atommaso”, ktp.

Nia plej grava tasko estas, ke fine stariĝu centra vortara komitato, kiu kreu tute unuecan, striktan kaj seneraran terminaron por ĉiuj konceptoj. Ni kiel eble plej frue devas kompili plejeble kompletan kaj fidindan terminaron. En tiu terminaro ni zorge evitu la plursencajn vortojn. Mi jam menciis la vorton „helico”, sed multaj aliaj troviĝas. Ekzemple la internacia vorto „modul” laŭ PV havas nur muzikan signifon. Laŭ Scienc-Teknika Terminaro (kiun okulfrape kreis elektristoj) ĝi havas nur elektroteknikan. Sed en internacia uzo ĝi havas ankaŭ matematikan kaj dentradteknikan signifojn.

Estas kelkaj vortoj, kies sencoj estas dubaj. Ekzemple „gisi” devenas el la germana „giessen”, sed laŭ PV signifas ferfaradon el erco, dum la originala germana

„giessen” signifas muldon, do ferverson en negativan formon. Same: „muldi” signifas laŭ PV: enverŝi fluecan feron en negativan formon (matricon). Ĝi devenas el la angla „mould”, sed angle signifas: fari matricon kaj ne enverŝi en ĝin feron. Por altfornego, do, kiu faras krudferon el erco, ne estas preciza vorto. „Altforno” estas nur alta forno, laŭvorta traduko de la germana „Hochofen”, sed en Esperanto ni devas havi sendubajn, precizajn terminojn.

Same ni ne havas kontentigan vorton por maŝino, kiu rulpremas la vojojn. Ni ne havas vorton por esprimi la premtranĉadon el lado (germane: stanzen), por esprimi la defrotadon de la supra tavolo, simile al la polurado. Ni ne havas vorton por la tre simpla premtenilo de la seruristoj, kiu per ŝraŭbo fikstenas la prilaboratan objekton. Por la kvarrada levilĉaro, kiu kuras sur la argano, ni povas uzi nur la vorton „levilveturilo”, kvankam ĝi tute ne veturas, nur iradas tien-reen. En astronomio ne estas akceptitaj tiom vaste uzataj vortoj, kiel „reflektoro”, „deklino”, „ascensio”. En geometrio ni ne havas vorton por la plej ofte troviĝanta ortangula kvarangulo, latine: „oblongum”. Ni ne transprenis la nomon „origo” por la nulpunkto de la koordinatoj, la nomon „kurvo” por la geometria figurado de la matematikaj funkcioj. Ni havas vorton „kondensatoro”, sed ne la vorton „kondensi”, t.e. refluidigi vaporon per malvarmigo*). Ni ne transprenis la tute internaciajn vortojn „suporto”, „etalono”, „ŝapingo”, „konstruktore”, „aŭtogena veldo”, „kartero”, „ekskavatoro”, „klinkero”, ktp. La vorto „revolvero” signifas nur pistolon, kvankam ĝia originala signifo estas turniĝanta maŝinparto, havanta plurajn poziciojn, ekzemple sur tornomaŝino.

Ni ne havas vorton por la inĝeniera desegna planado, do: kalkuli kaj plan-desegni. Ĉu eble konformus: „konstrukcii”?

★

Sed mankoj troviĝas ankaŭ en nia grammatiko, kiuj ankoraŭ pli-malpli malfaciligas ĝian aplikon al la moderna tekniko. Mi pensas unuavice pri la plur-

senceco de la sufiksoj, prefiksoj kaj prepozicioj, kion la vivo jam nun iom post iom forigas. Ekzemple: la prepozocio „de” havis multajn diversajn sencecojn, kiujn la komuna lingvouzo iom post iom ĉesigis per enkonduko de kunmetitaj prepozocioj, kiel: „ekde”, „depost”, „desur”, „fare de”, ktp.

Multsenca estis la sufikso „UJO”, kiu komence signifis kovrantan skatolajon, sed ankaŭ arbon kaj landon. Nuntempe ni jam ne diras „ĉerizujo”, sed „ĉerizarbo” kaj la landsufikso ankaŭ modernigas al „io”.

En la tekniko kaŭzas ioman malfacilaĵon la multisenceco de „EJO”, kiu konsistigas nomon de domo, ĉambro, kiel en vortoj „vendejo”, „preĝejo”, sed ankaŭ institucion, entreprenon, kiel „eldonejo”; lokon, kiel „haltejo”, „enirejo”, kaj placon, kiel „promenejo”.

„ULO” signifas ne nur homon, kiel „laborulo”, „mizerulo”, sed ankaŭ beston, kiel „mamulo”. Mi legis eĉ la vorton „nubskrapulo” pri altega domo. En la tekniko kaŭzas multan malfacilaĵon la sufikso „ILO”. Ekzemple „borilo” signifas ne nur la malgrandan manborilon, sed ankaŭ la grandegan bormaŝinon. Oni eĉ uzas ĝin por medikamentoj, kiel „dolorkvietigilo”, „laksigilo”.

La tekniko postulas striktajn, nemiskompreneblajn sufiksojn, tiom pli, ke jam nun nia lingvo estas la plej difinita, plej nemiskomprenebla, rilate al la naci-lingvoj kaj eĉ rilate al la ceteraj lingvo-projektoj. La plej grava manko de Volapük estis la plursenceco de la sufiksoj. Nur kiel amuzan ekzemplon mi volas menci la Volapükajn sufikson „AF”. Tiu konsistigis bestonon. Sed kiel? Ekzemple la vorto „flit” signifis: flugi. Se ni alkroĉas la sufikson „af”, fariĝas: „flitaf”. Kion signifis flitaf? Ĉiu povus pensi, ke ĝi estas birdo. Sed ne! Ĝi signifis: „muso”. Ĝuste muso el inter multegaj flugantaj bestoj! Birdo estis: „böd”. Krome, estis multaj, tute nedifinitaj sufiksoj.

Do, se ni ambicias, ke nia lingvo estu la latino de la tekniko, ni devas la sufiksojn plimultigi kaj pliprecizigi, ĉar la preskaŭ senlima fleksebleco kaj senlima ebleco por krei vortojn estas nia plej **granda**

avantaĝo kontraŭ la nacilingvoj, el kiuj neniu povas taŭgi por la rolo de scienca lingvo.

Novajn sufiksojn oni jam parte oficialigis en kemio, kaj PV jam entenas ilin. La samon ni devas estigi en la maŝinologio kaj en parencaj sciencoj.

Memkompreneble ni ne rajtas modifi la Fundamenton kaj ni eĉ ne devas. La miskompreneblecon ni povas eviti per novaj prepozicioj kaj sufiksoj. Tiel, kiel estiĝis „ekde” kaj „fare de”, sen modifo de la Fundamento; tiel, kiel estiĝis la land-sufikso „io”, ni povas estigi novajn sufiksojn: Ekzemple: „lavejo” esence signifas nur ĉambron, en kiu oni lavas, sed ĝi signifas ankaŭ entreprenon, fabriketon, kiu okupiĝas per lavado. Por la entrepreno ni povas trovi alian sufikson, eble el la franca kaj germana lingvo: „eri”, „laverio”. „Ulo” signifu nur homon. La mambesto estu mambesto kaj ne mamulo. Por bormaŝino ni povas trovi novan sufikson, kvankam ĝi ne estas facila: kelkaj proponis la sufikson „or”: „bororo”, „tornoro”. Sed oro estas metalo. Aliaj proponis la sufikson „ator”: „boratoro”, „tornatoro”. Sed same „at”, kiel „or” estas jam alisence uzataj vortetoj. Iu, dum la redaktado de Duden-bildvortaro, proponis la sufikson „adoro”, sed adoro havas tre precizan alian signifon: adorado.

Ni bezonas minimume dekduojn de novaj pre- kaj sufiksoj, kiuj faros nian lingvon taŭga por fariĝi absolute bona scienca lingvo.

Mi nur skizis niajn taskojn. La detaloj ne koncernas min, sed la lingvajn instancojn de nia movado. Mi resumas:

1. La teknika evoluo ege bezonas sciencajn lingvon kaj por tiu celo taŭgas nur Esperanto.

2. Por tiu celo nia tasko estas ne nur propagandi, sed ankaŭ plitaŭgigi nian lingvon, por ke ĝi senerare povu esprimi ĉiujn teknikajn konceptojn.

3. Maniero de plenumo estas: konstrui la unuecan, laŭeble kompletan teknikan vortaron, senerarigi la sufiksojn kaj estigi la necesajn novajn pre- kaj sufiksojn.

La oficialigo de Esperanto estas tre malfacila akiraĵo. Ni multe devos ankoraŭ batali kontraŭ miopaj naciaj ĵaluzemoj. Sed la tekniko jam ege bezonas nian lingvon. Tiu ĉi estas la plej aktuala kaj tial la plej facila vojo, per kiu ni povas penetri en la komunan vivon kaj, se tio ĉi realiĝos, la ceteraj paŝoj jam sekvos per si mem.

Sed la tempo jam urĝas nin, kaj la unuaj paŝoj ne plu estas prokrasteblaj.

Sándor Szathmári

Verkita antaŭ la pretiĝo de la manuskripto „Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto”.

*) Waringhien ŝovis ĝin en sian „Grand Dictionnaire E-Français”. - Red.

TABELO DE ENHAVO

	Paĝo
Enkonduko	kovrilo
Michaud, Pri rasismo, konscia kaj nekonscia	1
Jenečkov, Jugoslavio hodiaŭ	7
S. Aarse, Johano-Maria Guyau	10
Boutens, Pri la Rembrant-Festo	19
Kosinaka, Situacio en Azio	20
Goethe, El „Fausto II”	27
M. Starr, Usona Mozaiko	28
R. Schwartz, Laŭ mia Ridpunkto	32
W. P. Boelofs, Nia Mono	35
Benczik, Julio Baghy, mitoj kaj realo	42
Szilagy, Esperanto kiel lingvo de la moderna tekniko	52